

James Yorkston,  
Molly Malone

*tradukita de Jean-Marc Leclercq*

En bela Dublino,  
kie ravas la ino,  
Ekvidis dolĉegan mi Molly Malone.  
Ŝi travagis stratarojn  
puŝante la varojn.  
“Kardioj! Mituloj! Aĉetu de mi!”  
Ho freŝajn kardiojn,  
Ho vivajn mitulojn,  
Moluskojn vivegajn proponas mi!

Estis ŝi vendistino,  
sed ne miris Dublino,  
Ĉar ankaŭ tiel faris gepatroj de ŝi.  
Ili vagis stratarojn,  
puŝante la varojn,  
“Kardioj! Mituloj! Aĉetu de mi!”  
Ho freŝajn kardiojn,  
Ho vivajn mitulojn,  
Moluskojn vivegajn proponas mi!

...

James Yorkston,  
Mol Ní Mhaoileoin

*tradukita de Seán de Fréine*

Argiope-informo:  
La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.  
Supozeble la aŭtoro decidis tion.

...

Jen febro ekfortis,  
 pro tio ŝi mortis,  
 La fino alvenis al Molly Malone.  
 Fantomo nun vagas,  
 neniŭ nun pagas  
 Por kardioj, miltuloj puŝataj de ĝi.  
 Fantomajn kardiojn  
 Fantomajn mitulojn,  
 Fantomajn moluskojn nur vendas nun ĝi.

*Traduko de la Angla poemo "Molly Malone" de James Yorkston en Esperanton de  
 JEAN-MARC LECLERCQ (\*1961-10-10).*

*Arg-374-1886 (2013-11-25 11:01:43)*

*Traduko de la Angla poemo "Molly Malone" de James Yorkston en la Irlandan  
 de Seán de Fréine.*

*Arg-374-817 (2007-05-16 20:17:33)*

*Laŭ la irlanda kantlibro "Sing Along Linn" la tradukinto de tiu ĉi kanto estas  
 Seán de Fréine, 36 Nutgrove Park, Cluain Sceach, Baile Atha Cliath 14, Irlando.  
 Tel: 00353-(0)1-2694660 e-mail: defreine@iol.ie*